



Norvega Esperantisto

ESPERANTOBLADET

N-ro 9/10
1970

ORGANO DE NORVEGA ESPERANTISTA LIGO
ĈEFREDAKTORO: JOHAN HAMMOND ROSBACH

3-periodo
36-a (41-a) jaro
Monata

La laborplano de N.E.L.

(Daŭrigo).

Ĉapitro II temas pri Internaciaj Rilatoj, ĝi havas 6 punktojn:

1. «Senĉesa atentado pri la fakto ke Esperanto estas Internacia Lingvo kreita por internaciaj celoj.» Devus esti nenecese substreki tion al esperantistoj; sed ĉu vi, ekz. dum eksterlanda vojaĝo, ĉiam provas komprenigi vin *per Esperanto* en butikoj, poŝtoŝtancoj, ĝiĉetoj k.t.p. kaj ŝajnigas miron se oni ne tuj komprenas vin? Nur tiel oni ĉie vidos ke nia lingvo estas en regula uzo. Same, ĉu vi, skribante al alilanda institucio, skribas en Esperanto, atendante ke oni komprenos? (ev. aldonu la adreson de la Delegito de U.E.A. en la koncerna loko, por traduko de via letero kaj de la respondo).

2. «Instigado al individua internacia utiligo de Esperanto per korespondado kun eksterlando, abonado de eksterlandaj Esper-

ranto-revuoj kaj -gazetoj, partopreno en Esperantaj kongresoj kaj renkontiĝoj.» Ni regule publikigas korespondpetojn, esperante ke niaj legantoj utiligas ilin. Korespondado estas interesa kaj la plej bona kaj regula ekzercado. Same, bonega praktiko kaj tre interesa estas legado de alilandaj Esperanto-gazetoj, kaj en kongresoj kaj renkontiĝoj oni konatiĝas kaj amikiĝas kun homoj el ĉiuj partoj de la mondo. La kluboj devas regule instigi siajn membrojn laŭ ĉi tiu punkto.

3. «Instigado, ekzemple per artikoloj en Esperantaj periodaĵoj, al individuaj feriovojaĝoj al Norvegujo de eksterlandaj esperantistoj, precipe rekomendante sezonojn dum kiuj la lokaj societoj havas kunvenojn.» Ĉi tiu punkto certe estas nesufiĉe atentata, sed ĝermas planoj por plibonigi tion.

4. «Starigo de kontakto koresponda kaj laŭeble intervizita inter Norvegaj kaj eksterlandaj lokaj societoj.» Ŝajnas ke niaj kluboj malmulte atentis ankaŭ tiun punk-

(Daŭr. p. 117)

Kontaktoj

Eble iu forte sonigos la flartruojn, trovante, ke la enhavo de artikolo titolita «Kontaktoj» temas pri poŝtmarkoj. Eble kelkaj el niaj legantoj trovos, ke ni nun skribis iom tro pri tiu temo. Ĝuste ili bonvolu legi la reston de ĉi tiu artikoleto (se ili ankoraŭ havas tempon). Ĝuste pro ili ni malkovris tuj la temon.

Kial ni uzas tiom da spaco en relative malgranda revuo por temo, kiu nature interesas nur kelkajn malmultajn legantojn? Nu, la temon ni ja ne filatele kovras. Bedaŭrinde, skribis unu el niaj legantoj, kiu dezirus filatelan kolonon. Anstataŭe ni donis al li lingvan kolonon, promesante filatelan, se li esperantigos dum 1971 minimume dek filatelistojn.

ĈU VI SCIAS —?

Ĉu vi scias, ke la redakcio de Norvega Esperantisto estas pro nepre necesa leterskribado (i.a. skribado de leteroj, kiuj devus esti nenecesaj; urĝigoj, demandoj pri promesitaj kontribuadoj ktp.) fervora leterskribanto, kaj tial uzanto de multa mono por afranko? Ĉu vi scias, ke nia malgranda gazeto povus multe grandiĝi, se ni havus la necesan monon? Eble ne scias, eble ne pripensis, sed nun sendube tuj komprenas.

Ĉu jena argumento estas frapa: ĝis nun la poŝtmarkagado de la redakcio kovris ĉiujn afrankajn elspezojn de la sama redakcio por la tuta jaro 1970! (Parenteza de-

mando: kiom ĝi aldone kovrus, se ankaŭ vi kaj vi kaj vi partoprenus?)

EKONOMIO

Tiuj ŝparitaj ducent kronoj povas nun esti alimaniere uzitaj. Oni nomas tion ekonomio. Eble la jaro 1971 povos per la poŝtmarka afero enspezigi la duoblon. Tio estus duobla ekonomio.

Sed tiu ekonomio dependas komplete de la reago de niaj legantoj. Eble estas jam tro frue atendi reagon al la speciala cirkulero de la afero elsendita al ĉiuj kluboj de la redakcio. Sed reago devas esti.

La redakcio povas fari nenion alian koncerne ĉi tiun aferon, ol ĝin estri, aranĝi.

STOKO

Dum la somero la ĉefredaktoro pretigis 500 kovertetojn kaj post la somero aliajn 500 kovertetojn. Tiuj mil (minus 40) kovertoj enhavas la «lotojn» per kiuj vi povas gajni Esperantan libron — kaj per kiuj vi povas — ĉefe — fortigi nian ekonomion. La venditaj 40 jam enspezigis 80 kronojn ÷ afranko.

Cetere: ni iam skribis, ke ni ne povas disvendadi la poŝtmarkojn. Tiun malpromeson ni retiras. Ni vigle revendas. Kaj strange: plej vigle aĉetas svedaj legantoj.

Ni povas nun vendi polajn kaj finnajn poŝtmarkojn por duona

(Daŭr. p. 121)

Norvega Esperantisto

ESPERANTOBLADET

Redakcio: Johan Hammond Rosbach,
Hans Amund Rosbach.

Adreso de la redakcio: Hulderveien 17 B,
N-1700 Sarpsborg. — (Limdato por
manuskriptoj: la 20. en la monato
antaŭ la apero.

Abonprezo: En Norvegujo kaj ekster-
lando: n. kr. 12,—.

Anonprezoj: 1/1 paĝo kr. 150,—,
1/2 p. kr. 75,—, 1/4 p. kr. 40,—,
1/8 p. kr. 20,—.

Antaŭ Kristnasko

Antaŭ Kristnasko tiom da pensoj vagadas tra la cerbo. Oni planas pri donacoj, oni adaptiĝas al la solenaj tagoj, kiuj - vole-nevole - signifas ion por la mensa trankvilo de ĉiu el ni.

Bonan Kristnaskon!

Tuj post la solenaj tagoj sekvas la ĝojo ligita al la jarŝanĝo. Ankaŭ tiu tago pensigas. Ofte oni decidas pri nova kaj pli bona vivo, la intencoj pri altigita aktivado estas ĝenerale pli ordinara dum la du lastaj tagoj, ol iam en la aliaj 363.

Ĉu vi planas ion koncerne la esperantistan aktivadon?
Feliĉan novjaron!

*

LA KONTORFONDAĴO

Pli frue kr. 456,03
÷ erare notita » 11,00

	kr. 445,03
Esp.klubo en Løten .. »	25,00
E. Andersen »	25,00
S. Korstvedt »	20,00
J. Berggreen »	17,50
Å. Birkenes,	
D. Birkelund »	100,00
O. Skaane »	20,00
R. Bugge-Paulsen .. »	60,00
C. S. B. »	60,00
A. Refsing »	180,00
Kristiansands	
Esp.klubb »	50,00
O. Rygg »	5,00
	Kr. 1 007,50

LA PROPAGANDA FONDAĴO

Johs. H. Lund kr.	27,00
E. & J. Matland »	10,00
	Kr. 37,00

Sciigoj de N.E.L.

Kursoj. Estas jam tempo por plani la kursojn dum la venonta printempa sezono. Kluboj, kiuj spite nian insistan alvokon, tamen ne aranĝis kursojn dum la ĵus pasinta aŭtuno, devas nepre aranĝi almenaŭ unu kurson dum la printempo. — Sen kursoj neniu progreso! Kaj ĉiuj kluboj ja devas progresi!

Korespondaj kursoj. Notu bone ke membro, kiu varbis kursanon por la koresponda kurso (parto I aŭ ambaŭ partoj kune), rajtas depreni varbpremion de kr. 5,00 kiam li sendas la mendon. Prezoj: Parto I kr. 23,00, parto II kr. 25,00, ambaŭ partoj kune kr. 42,00. Por ano de studrondo de minimume 5 anoj la prezoj estas: kr. 17,00, kr. 19,00, kr. 32,00.

Prelegoj. Se vi faras prelegon pri Esperanto, bonvolu nepre sendi raporton al N.E.L. Blankedojn por tiaj raportoj ni sendas je peto.

Taskotabelo por la kluboj. — *Decembro:* La estraro ripetas la admonon al la membroj pagi la kotizon por la venonta jaro, kaj la kasisto daŭrigas la enkasigadon de tiuj kotizoj. La Delegito de U.E.A. daŭrigas la kolektadon de U.E.A.-kotizoj por la venonta jaro kaj la varbadon de novaj Individuaj Membroj de U.E.A. Estrarkunveno planas la kunvenojn de la venonta monato kaj komencas plani la printempan laboron de la klubo. Tuj post la 15a la komisiito de la Eldonejo sendas raporton kaj pagon por venditaj libroj al la Eldonejo.

Januaro: La sekretario ellaboras la jarraporton pri la pasinta jaro. La kasisto fermas la kontojn kaj ellaboras kalkulraporton kaj bilancon. La revizoroj kontrolas ke la kasisto faras tion, kaj postulas la kontlibrojn por revizio. Estrarkunveno planas la kunvenojn de la venonta monato, kaj ĝenerale la printempan agadon, kaj priraktas la jarraporton, kalkulraporton kaj bilancon, multobligas ilin kaj sendas kun skriba kunvoko pri ĝenerala kunveno al ĉiuj klubanoj. Tuj post la ĝenerala kunveno la sekretario sendas raporton pri ĝi (blankedo A 9) al N.E.L. kaj al la Distrikto. Antaŭ la 15a la sekretario sendas raporton pri la 4a jarkvarono kaj studraporton pri la 2a jarduono de la pasinta jaro (bl. A 10/E 1) al N.E.L. kaj al la Distrikto. La raportanto sendas raporton pri la klubkunvenoj al Norvega Esperantisto. La kasisto rekte petas la kotizojn de la nepagintaj membroj kaj sendas kotizojn kaj liston al N.E.L. kaj al la Distrikto.

La Liga Estraro.

I rapporter til Norvega Kroniko — og ander steder — kan man lese «la prezidanto disdonis diplomon al s-ro A. - -» Tenk over hva prefikset *dis-* betyr, så unngår De det en annen gang!

interesserte

«Interesserte kan henvende seg til . . .» *Skriev ikke* interesuloj, for det betyr noe ganske annet, nem-

lig interesaj uloj, interesaj personoj, på samme måte som junuloj betyr junaj personoj. «Interesserte» er folk som interesserer seg for noe. «Å interessere seg (for)» heter *interesiĝi (pri)*. Altså er *interesiĝ-antoj* et forslag til oversettelse av «interesserte».

Ak. III.

(Daŭr. de p. 113)

La laborplano....

ton; sed estas evidente ke ĝia aplikado grave plivigliĝis la kluban vivon. Ni forte rekomendas al la kluboj provi la metodon.

5. «Invitoj al eksterlandaj esperantistoj ĉeesti landkunvenojn de N.E.L., distriktajn kunvenojn kaj specialajn renkontiĝojn. Klopodado aranĝi internaciajn Esperantajn kunvenojn kaj kongresojn en nia lando kaj apogo al tiaj aranĝoj faritaj de aliaj organizoj.» Ni efektive invitas eksterlandanojn al niaj landaj kongresoj, sed povos tion fari en pli granda mezuro. La Distriktaj estraroj same faru por la distriktaj kunvenoj. Universala Kongreso okazis en nia lando nur unu fojon (1952). Kiu klubo estas preta inviti la kongreson, ekz. por 1973 aŭ posta jaro? U.E.A. petas tiajn invitojn. Siatempe ni havis la libertempejon en Lofthus. Eble oni povos repreni tiun ideon, realigante ĝin ekz. en Budor?

6. «Starigo de kontakto kun internacie laborantaj organizoj kaj kun organizoj kiuj per Esperanto povas starigi kontakton kun sam-

celaj organizoj en eksterlando.» Ĉi tie ni havas vastan laborkamp-on apenaŭ plugitan. Ĉiu esperantisto, kiu havas kontakton kun internacia laboranta organizaĵo, devus proponi al ĝi la servojn de Esperanto kaj helpi al ĝi per tradukado k.t.p. en la una tempo. Baldaŭ la organizaĵo konstatos ke estas utile ke iu el ĝiaj funkciuloj lernas Esperanton. Ni montras al la ekzemplo de la Turisttrafika Asocio de Oslo kaj Ĉirkaŭaĵo, kaj ankaŭ al Norvega Ŝtata Fervojo. Ambaŭ estas tre kontentaj pri la utilo de Esperanto. Klopodu same ĉe aliaj organizaĵoj kaj institucioj. Tiaj pruvoj pri la praktika utilo de Esperanto estas tre gravaj por la disvastigo de la lingvo.

(Daŭrigota).

Letero pri la Kongresraporto

Estimataj redaktoroj,

ne estas mia kutimo oficiale pozicii al la kongresraportoj jen kaj jen aperantaj en la E-gazetaro. Ankaŭ tiu ĉi letero ne celas tion. Ĝi estas simpla persona danko al Annalise Torgnes, kiu same persone priskribis la impresojn pri la 55-a UK en Vieno en vis eldono n-ro 7/1970.

Por montri al la verkinto, ke la rekomendoj por la kongresorganizantoj (paĝo 89 maldekstre) ne restas ne legitaj, mi faras jenajn komentojn: *Tuttaga deĵorado ĉe ĝicetoj.* Konsentite. Nur havi homojn, kiuj estas pretaj kaj sufiĉe nombraj por tia deĵorado! Mi



à dele ut

Det er selvsagt helt korrekt å si «li disdonis diplomojn al tiuj, kiuj faris la ekzamenon». Hvis det derimot er bare én som har tatt eksamen, blir det mere problematisk.

klopodos en Londono. La poŝtgiĉeto, la bank- kaj vojaĝoficeja giĉetoj dependas ofte de la kompanioj kaj iliaj respektivaj oficehoroj, almenaŭ tiel estis en Vieno.

Formato de la Kongreslibro. Ĉi-jare por la unua fojo aperis separata eldono de la kongresa programo ĝuste por solvi tiun problemon, al kiu aludas la verkinto de via raporto. Ĉu s-ino Torgnes ne rimarkis tion? Mi sendas 2 ekz. de tia aparta programo al vi. Ĝi ne havas formaton de la Jarlibro,

sed ĝi estas facile faldebla kaj malpeza, ĉu ne vere?

Gazetara Servo. Pri tiu punkto mi korespondis kun la estro de la KGS, s-ro Marinko Gjivoje. Estonte la gazetaraj bultenoj devas atingi pli vastan publicon.

Do, refojan dankon pro via intereso kongresraporto.

Ĝis la revido en Londono!

Sincere via

Mikuláš Nevan

(KKS)

56-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Londono, 31.7 - 7.8-1971

Alta Protektanto: Lordurbestro de Londono Sir Peter Studd.
Konstanta Adreso: Nwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando.

Ĉu vi estas inter 6 kaj 16?

La 12-a Internacia Infana Kongreseto, kiu okazos samdate kun la 56-a UK en Britujo, promesas fariĝi alloga renkontejo por 60 geknaboj inter 6 kaj 16 jaroj, kies kompetenta lingvoscio de Esperanto ebligas sekvi la programon gvidatan tute en Esperanto. La novaĵo ĉi-jara estas i.a. aldona libervola restado de unu semajno (6.8.—13.8.1971) post la tradiciaj datoj de la kongreseto. Unua informilo kaj aliĝiloj estas senpage riceveblaj ĉe la konstanta adreso de la Kongreso.

Helpu al la infanoj!

Speciala fondaĵo «Adoptaj Gepatroj» estas destinita por helpi la infanojn el nepagipovaj landoj kaj

de nebonstataj familioj partopreni la Infankongreseton. Kontribui povas ĉiu esperantisto aŭ Esperanto-societo sendante monon al la kongreso.

«Tiom por vidi»

kaj «tiom por fari (kaj tiom por memori!) en London '71» heroldas la violkolora reklamilo de la 56-a UK, eldonita de LKK sur ledpapero de formato 118 x 169 mm. Senpagaj ekzempleroj por reklamaj celoj estas haveblaj ĉe UEA.

Belartaj Konkursoj 1971

Ĉiuj UEA-membroj aŭ la kongresanoj, kiuj havas talenton por la belartaj branĉoj poezio, prozo aŭ teatraĵo, estas invitataj konkursi sub aŭspicio de UEA kaj

gajni unu el la premioj. Petu detalojn de la sekretariino s-ino Emilija Lapenna, Nova Ves 32/III, Zagreb, Jugoslavio. La limdato estas la 31-a de marto 1971.

Vojaĝos karavane

Favorprezan grupvojaĝon al la kongresurbo 1971 anoncas la Esperanto-Asocio de Finnlando (S-ro Raimo Strandén, Louhentie 11 C 51, Tapiola), la Japan Esperanto-Instituto (Hongo 2-2-14, Tokio), la Turisma Fako de Hispana Esperanto-Federacio (F-ino Inés Gastón, P. Marina Moreno, 35, 4º deha, Zaragoza). Apartan mencion meritas la karavano de f-ino M. H. Vermaas (Nwe Binnenweg 70 II, Rotterdam-2, Nederlando), kiu proponas al la partoprenantoj allogan unusemajnan restadon antaŭ la Universala Kongreso . . . en Islando!

Dumkongresa libroservo

Komisiita de la LKK, Brita Esperantista Asocio organizos la

oficialan librovendon dum la 56-a UK. Por ke ĝi provizo estu kiel eble plej kompleta kaj por la aĉetantoj varia, oni petas ĉiujn Esperantoeldonejojn kontakti al BEA-Libroservo, 140 Holland Park Ave., London W. 11, Britujo kaj eventuale proponi siajn titolojn.

Kampadejoj haveblaj, sed . . .

Kiel informas la sekretario de Brita Asocio de Esperantistaj Kampadistoj kaj Ruldomistoj, s-ro F. J. Swan (7, Brooklands Road, Cosby, Leicester, LE 9 5SD), li mem estas preta aranĝi aferojn kaj doni konsilojn al tiujn, kiuj volas kampadi dum la Kongreso. Sed por rezervigi lokon en la proksima kampadejo, li devas ricevi sinanoncojn antaŭ la fino de 1970.

Statistiko (26.10.70)

Entute 235 personoj el 28 landoj.

TEJO-novaĵoj

«TEJO KAJ VI» —
NOVA VARBBROSURO

Tyresö, Svedio — La unuan fojon en sia historio, TEJO aperigis informan broŝuron pri si mem. La broŝuro celas popularan manieron informi pri multaj faktoj de la agado de TEJO, kaj ĝi estas unuavice destinita al tiu esperanto-junularo, kiu troviĝas ekster la organizaj kadroj de TEJO. La 16-paĝa informilo, pro-

vizita per fotoj, estas tre modernaspekta. Ĝi estas ricevebla de la kasistino de TEJO, Ulla Luin, Mygdalsvägen 123, S-13500 TYRESÖ, Svedio. Preskaŭ samtempe en Nederlando reeldonigis la varbilo-aliĝilo «TEJO kaj la junularo esperantista». Ĝi estas kvante mendebla ĉe la Centra Oficejo de UEA. Ambaŭ novaj eldonaĵoj siaflanke kontribuas al la escepte ampleksa varbkampanjo, kiun TEJO entreprenis ĉijare por plialtigi la membronombron.

*

TEJO ENKETAS . . .

Sundsvall/Bygdoszcz — La Kultura Fako de TEJO entreprenis ampleksan enketon pri aŭskultado de esperantlingvaj radioprogramoj. La enketo celas trovi metodojn por stimuli ĉe la junularo la aŭskultadon de la radioelsendoj. Krom respondi la enketilon, la enketatoj havas eblecon doni sian prijuĝon de la aŭskultataj elsendoj kaj sugesti plibonigojn. Ĉi tio aparte rilatas al la junulara programo de Pola Radio. La enketon gvidas estraranino de TEJO, Ingrid Carlsson, kaj Hartmut Traummüller, membro de la Komisiono pri Kultura Agado de TEJO.

Samtempe, alia estrarano de TEJO, Andrzej Grzebowski, enketas Junularajn Delegitojn de UEA pri ilia laboro dum 1969. Tiu ĉi enketo servos unuavice por serioza analizo de la bezonoj de tia servo, kaj surbaze de ĝiaj rezultoj estos organizita laboro de la Junularaj Delegitoj en sekvantaj jaroj. Tiurilate opinioj kaj sugestoj de la enketatoj estos speciale valoraj.

*

«NIAJ ROLULOJ»
EN NOV-ZELANDO

Upper Hutt (EJANZ) — Esperanta Junulara Asocio de Nov-Zelando eldonis la duan legolibreton sub titolo «Niaj Roluloj». La libreto estas tre taŭga per kluboj kaj lernejoj, grupoj kaj individuoj, infanoj kaj komencantoj de ĉiuj aĝoj. La unua legolibreto eldonita de EJANZ, «Al la savo», parte nacilingva, tute disendiĝis. «Niaj Roluloj» estas dume komplete en Esperanto. Informpetojn aŭ mendojn sendu al: EJANZ, P.O.Box 40-181, UPPER HUTT, Nov-Zelando.

UNESKO-novajoj

PROTEKTO AL KULTURA
HEREDAĴO BELORUSIA

Protektion al la nacia heredaĵo arta kaj historia ĵus leĝigis la Ĉefsoveto de Belorusio (Sovetunio). La nova leĝo tuŝas diversaspekte konservon kaj riparon de la monumentoj kaj elstaraj arkitekturaĵoj de la lando.

Historiaj konstruaĵoj en Belorusio multon suferis dum la du mondmilitoj. Kelkaj estas jam riparitaj, inter kiuj al katedralo de Sankta Sofia kaj la preĝejo Spaso-Efrosinjevskaja en Polotsk, kaj la fama Blanka Turo en Kamenec — tri majstraĵoj de tradicia arkitekturo. Ke la publiko montras grandan intereson pri konservado, tion pruvas la membro-nombro de la Belorusia Societo por Protekto de Monumentoj — pli ol 400 000! Ekde nun, ankaŭ la leĝo protektos ĉiajn erojn de la nacia heredaĵo kaj konservos ilin en bona stato por la venontaj generacioj.

(Laŭ Unesko-novajoj kaj
Informa Servo de UEA)

*La kampanjo inter la skoltoj.
Japana Skolt-asocio
dungas Esperantiston.*

Jam pli ol unu jaro, multaj esperantistoj aktivas por enkonduki nian lingvon en la Skolta Movado. Kaj ĝis nun la progreso estas malrapida, sed absolute konstanta.

Speciale en Japanujo, la lando de la venonta Monda Jamboreo, oni diligente laboris.

Du aferoj speciale estas menciindaj.

Unue la atentigo pri nia lingvo ne plu nur venas de «ekstere», sed parte jam okazas en la Skolta Movado mem. Pluraj skoltoj gazetoj jam enhavis anoncojn pri korespondo en Esperanto, kaj ĉiu tia anonco estas grava kaj senpaga pruvo pri la utilo de nia lingvo, kaj certe havos efikon.

Dua notinda fakto estas, ke la esperantisto s-ro Ken Fukuba ek de la unua de aprilo laboros kiel sekretario ĉe la Japana Skolt-asocio. Ni povas supozi ke la elekto de S-ro Fukuba estas rezulto de la ŝanĝanta sinteno de la Skolta Movado rilate al Esperanto.

Se dum la jamboreo en Japanujo sufiĉe da skoltoj parolos nian lingvon, ilia ekzemplo certe atentigos multajn pri la utilo de nia lingvo. Tio helpas al nia afero pli, ol la plej grandskala propaganda laboro.

Se la nombro tamen estus tro malgranda, oni ne rimarkus ilin, kaj tio certe malbone influus nian estontan laboron.

Se ni konsideras ke ekzistas 20 milionoj da geskoltoj, multe da laboro ankoraŭ estas farota.

Tial ni denove invitas al ĉiu esperantisto eklabori, aŭ daŭrigi la laboron.

Al ĉiu klubo ni petas koncentrigi ĉiujn fortojn je la skoltoj, ĉar tia koncentrigo de fortoj kreos la plej bonan eblecon por sukceso. Kaj tiu sukceso certe havos grandan valoron por postaj agadoj en aliaj medioj.

Por ebligi ĉies kunlaboron, ankaŭ de ne-skoltoj, SEL preparis informilon, kiu enhavas ideojn kaj konsilojn. La ĝen. sekretario de SEL, J. K. Hammer, Taxusstraat 7, Zaandam, Nederlando volonte ĝin sendos. Oni bonvolu aldoni resp. kuponon.

*

(Daŭr. de p. 114)

Kontaktoj

katalogprezo. (Sed oni ne povas mem elekti markojn). La arabaj pm. estas jam forvenditaj — pro tio, ke la plej multaj aĉetintoj aĉetis ankoraŭ unu fojon. Ankaŭ alilandajn pm ni povas nun liveri: skribu simplan poŝtkarton, demandu, ĉu ni povas sendi. Vi devus iam vidi nian stokon: du bretaroj plenaj.

KONTAKTOJ

Kaj nun fine pri kontaktoj, se vi, grumblanto, ankoraŭ sekvas nin: La klubo en Bodø, kiu antaŭ la somero sendis 5 kilogramojn da norvega «kilovaro» (t.e. poŝtmarkoj sur papero), informas, ke ĝi per ĉiuj siaj membroj ade kolektas pm por nia gazeto, kaj dum klubkunvenoj tondas kaj ordigas. Koran dankon. Ĉu aliaj kluboj povos same fari? Ĉu iu havus kontakton kun kompetentulo ĉe ĉefpostejo, kiu povus havigi uzitajn pm de 20 kronoj?

Privatuloj (ĝis nun la kluboj malmulte) aĉetis pm kun loka stampo klare legebla. Ĉu ne kluboj, kial?


Multajn el la ricevitaj poŝtmarkoj la redaktoro metis en kajerojn, kiuj nun per profesia poŝtmarkvendo (kiu kompreneble ankaŭ gajnos siajn procentaĵojn per tio) cirkulas tra la lando, inter fervoraj filatelitoj. Sur tiuj kajeroj staras: «Apartenas al Norvega Esperantisto. La poŝtmarkoj estas la rezulto de kontaktoj per Esperanto.»

JHR.

FERVOJISTA PAĜO

ORGANO DE NORVEGA
ESPERANTISTA FERVOJISTA
ASOCIO — NEFA

Kaldbakkstribben 22, Oslo 9
Redaktoro: Odd Kolbrek,



La lasta vojaĝo por 60 jara lokomotivo en Nov-Zelando

En Nov-Zelando nun ne plu en Norda Insulo estas aplikataj vaporlokomotivoj, kaj en Suda Insulo nur kelkaj. Lastjare veturigis kromtrajno kun fervojentuziastoj la proksimume 1300 km. longan distancon de Greymouth tra Christchurch kaj Picton en Suda Insulo, trans la markolo Cook Strait kaj poste tra Wellington kaj laŭ la ĉeflinio de Norda Insulo al Auckland.

La trajno, kiu konsistis el tegita varvagono, 3 pasaĝervagonoj kaj 3 netegitaj varvagonoj kun karbo, estis tirata de veteranlokomotivo — tipo Ww — kiun oni intencas meti en la proponatan hobiafervojn, kiun la anoj de fervojentuziastkluboj esperas konstrui laŭ parto de la nun ne plu aplikata flanklinio de la ĉeflinio — de Paerata al Waiuku (proksime al Auckland). Proksimume 5 km. longa trako pretiĝos por ke estu eble veturigi la malnovan vaporlokomotivon kiel ripoztag- kaj turistallogaĵon, sed la laboro longe daŭros.

La trajno kaŭzis grandan admiron kaj atenton en la diversaj lokoj kaj urboj, kiujn ĝi trapasis, ĉar hodiaŭ vaporlokomotivo estas stranga spektaklo, nekonata en Norda Insulo kaj preskaŭ nekonata en Suda Insulo. Multaj infanoj tute ne vidis tian lokomotivon.

Estis kelkaj, kiuj aŭtomobile akompanis

la trajnon, almenaŭ parton de la distanco, kaj de oportunaj lokoj fotografis la trajnon. Pro tio ili, ekzemple proksime al Wellington, tiucele metis siajn aŭtomobilojn tiamaniere, ke ili akiris la indignon de la trafikpolico kaj devis pagi punmonon.

Ĉar preskaŭ ne ekzistas vaporlokomotivoj, la antaŭe aplikataj «akvoturoj» — grandaj, altaj ujoj, el kiuj oni survoje plenigis la akvujojn de la vaporlokomotivoj — estas forigitaj. Pro tio estis laŭ la vojaĝdistanco de la kromtrajno metitaj cisternportantaj ŝarĝaŭtomobiloj, el kiuj oni plenigis la akvujojn de la veteranlokomotivo. Ĉi tiuj cisternportantaj aŭtomobiloj, kiuj tiucele estis pruntedonitaj, ordinare aplikigas por transportado de lakto.

La veteranlokomotivo estis survoje provizita per karbo de la 3 netegitaj varvagonoj.

Ĝis la hobia fervojo estos pretkonstruata, la veteranlokomotivo troviĝas en la Glenbrook fervoja muzeo.

Mi memorigas pri La Fervoja Terminaro Norvega — Esperanta, Esperanta — Norvega, kiun vi povas mendi ĉe mi laŭ la adreso en «Fervojista Paĝo». Vendoprezon en Norvegio 5 kr., eksterlande samvalore kiel 1 US dolaro.

La redaktoro.

Norvega Kroniko

Oslo

3/9.70. La prez. Annalise Torgnes deziris koran bonvenon al la unua kunveno en la nova laborsezono.

Kiel «Vorto por pripensoj» Randolph Grotmål legis la finan parton de la salutparolado de D-ro h.c. Franz Jonas, Ŝtatprezidanto de Aŭstrujo kaj Alta Protektanto de la Kongreso, dum la Inaŭguro de la 5-a Universala Kongreso de Esperanto en Vien ĉi-jare.

Annalise Torgnes donis superrigardon pri la oficialaj okanzintajtoj de la Kongreso en Vien, kaj Pepita de Caspary rakontis kaj montris lumbildojn pri la vojaĝo al Vien kaj la restado tie.

Dum la kafopaŭzo Lovise Bøe legis el la dana gazeto «Aktuelt» intervjuon kun L. Friis, en kiu li diris: «Esperanto — la lingvo de la komuna merkato.»

Raportis *Harda Danielsen*

*

Kluba ekskurso: La «Operacio Plenluno» okazis dum la semajnfino 12.—13. de sept. tute laŭ la programo, sed eble ankoraŭ pli sukcesa ol oni antaŭe kuraĝis esperi. Tiel multe kiel 22 esperantistoj trovis la okazon partopreni la tre agrablan kunestadon en la kampara hejmo de nia klubano Randolph Grotmål en Aremark. La luno vere ankaŭ favoris nin per sia apero inter la nuboj nokte kaj same faris la suno tage inter la

pluveloj. Ĝuste la ŝanĝanta vetero kontribuis al tio ke la endoma restado iĝis tiel agrabla kaj kuniga. Ni ĝuis la kolbasojn kaj kotletojn kaj alian provizaĵon. La gastiganto festenigis la etoson farante brulon en la aparta fajrejo ĉe kiu ni kantis je lia gitara akompano multajn kantojn. Dum ĉi tiu aranĝo eĉ tradukiĝis esperanten tute nova kanto laŭ belega Irlanda meledio, kaj ĝin ni speciale ekzercis. Cetere okazis longaj diskutoj pri altnivelaj lingvaj kaj gramatikaj problemoj inter la lertuloj, kaj aliaj aŭskultis kun granda intereso. Kelkaj estis ĉiam okupitaj en la kuirejo, kie ni bonkonsente dividis la devojn. Tre interesan viziton ni ankaŭ faris al la privata muzeo de la patro de Randolph, kiu konservas tre interesan kolektaĵon da malnovaj objektoj kaj laboriloj uzitaj dum antaŭaj tempoj en tiu bieno konata dum multaj jarcentoj. Gojigo estis ankaŭ por niaj klubanoj havi okazon pli bone konatiĝi kun samideanoj el la ĉirkaŭa distrikto, kiuj alvenis por renkonti nin. Entute ĉi tiu aranĝo estis nova, bona memoro kaj sperto en la vivo de niaj klubanoj.

Raportis *Annalise Torgnes.*

*

21/9.70. Dezirinte koran bonvenon al la ĉeestantoj, la prez. Annalise Torgnes diris memorigajn vortojn okaze de la forpaso de 2 el niaj membroj, nome Rolf Uhlen kaj Olga Wilke. Je la funebra ceremonio ĉe la enterigo de Olga Wilke 12 el la klubaj membroj ĉeestis.

Dum la posta kunestado en Slem-dal Hotell, Randolph Grotmål kantis, kaj la esperantistoj komune kantis du himnojn esperantlingve.

Kiel «Vortoj por pripenco» R. Grotmål legis la poemon «Faru laboron frue».

La programo por la hodiaŭa kunveno estis: Diskutvespero kun temo «Kion fari por progresigi Esperanton?»

Kirsten Ek enkondukis kaj interalie ŝi citis parton de festparolado de la prezidanto de U.E.A., prof. d-ro Ivo Lapenna. Einar Gustavsen gvidis la diskutadon. Diversaj membroj partoprenis, inter ili Otto Prytz, Pepita de Caspary, John Berggreen, R. Bugge-Paulsen, Tamiko Kaŭakami, C. Støp-Bowitz, Annalise Torgnes.

Raportis *Harda Danielsen*

*

1/10.70. La prez. Annalise Torgnes deziris koran bonvenon al la ĉeestantoj, kaj precipe al nia gasto F. Lindholm, kiu en la nomo de la Laborista Esp.klubo invitis nin al festo (Zamenhof-vespero) la 16/12 en Fjortoftsalen, Samfunns-huset.

Kiel «Vortoj por pripenco» Annalise Torgnes legis el la Eta Ruĝa Libro de Maŭ Zedong el ĉapitroj pri Lernado kaj Kritiko kaj memkritiko.

Prof. Olav Reiersøl faris prelegon pri «La teknika evoluo en Ĉinujo kaj Okcidenta Eŭropo dum la mezepoko». Li tre interese rakontis pri ferfarado kaj akvorado, pri paperfarado kaj presarto, pri invento de pulvo kaj pulvopafiloj,

pri eltrovo de la magneta kompasoj kaj pri ŝipkonstruado. Fine li aldonis ankaŭ kelkajn informojn pri la evoluo de la astronomio kaj de sciencoj ĝenerale.

Per stranga koincido montriĝis ke hodiaŭ estas la nacia festotago de Ĉinujo.

Otto Prytz kunportis sian sonbendaparaton, sur kiu li surbendigis la esp. elsendojn de Itala kaj Pola Radioj, precipe la «leterkestojn», kaj li disaŭdigis ilin al ni. Poste multaj el la membroj sendis dankleterojn al la nomitaj radiostacioj.

*

19/10.70. La vicprez. Thor Magnus Carlsen gvidis la kunvenon. Li bonvenigis nian gaston s-ron V. Skimundris, kiu estas docento ĉe la Litova Veterinara Alternejo en Kaŭnas, kaj kiu dum la kafopaŭzo faris salutparoladon de sia hejmlando Litovio, kaj donacis tre belan bild-libron pri Kaŭnas.

R. Grotmål kiel «Vortoj por pripenco» legis el la libro «Gaja Knabo» de Bjørnstjerne Bjørnson, pri Øyvind venanta al la lernejo.

Astrid Manrud faris prelegon pri «Instruado en la nuntempa lernejo kompare al pli frue». Ŝi skizis la pedagogian evoluon de Sokrates, la fondinto de la pedagogio, Karlo la Granda, kiu enkondukis laŭleĝe deciditan devigan lernejon, kaj ĝis la lasta Normalplano por la elementa lernejo.

Iom post iom evoluiĝis la instrumentario, kaj la celo estis ne nur doni al la lernantoj sciojn, sed helpi ilin al kompreniĝo, mem-

stara pensado kaj juĝpovo, tiel ke ili povas realigi la scion en sia vivo.

Otto Prytz rakontis ke la Pola Radio en la «leterkesto» diris, ke Norvegujo nun estas unu el la gvidaj landoj rilate al aŭskultantleteroj, dank' al la poŝtkarta agado de Tamiko.

Raportis *Harda Danielsen*.

*

Sauda

Klubkunveno ĉe gesinjoroj Veka la 7-an de septembro 1970. Malfermo per la kanto «La tagiĝo». Kiel «Mian poemon» Olav Andersen laŭtleĝis el la libro «Den spanske tragedie» la poemon «La hispana junularo» de Miguel Hernandez. Johan Matland laŭtleĝis «Kiel mi fariĝis esperantisto». Li estas unu el la fondintoj de la klubo en Sauda, kaj kiam la klubo ekagis, la 22-an de marto 1937, li jam estis esperantisto dum multaj jaroj. «Lingva kvaronhoru» gvidata de Norman Birkeli, kiu temis pri traduko de Esperanto al norvega lingvo. La tasko estis tre malfacila tiun fojon, sed interesa. Kafopaŭzo.

La prezidantino sciigis nin pri komenco de Esperantokurso tie ĉi. Aranĝanto estas A.O.F. en Sauda, sed ĝis nun bedaŭrinde tro malmultaj sin anoncis.

Arthur Bjerke rakontis pri ferio en Hispanio kun montrado de lumbildoj. La venonta klubkunveno okazos iam en oktobro, kaj tiam ni provos venigi Olav Thor-

modsen ĉi tien por rakonti pri sia partopreno en la mondkongreso en Vieno.

A. Bj.

*

Sauda Esperantoklubb aranĝis kunvenon kune kun invititaj gastoj de «Mara Vento» dimanĉe la 4an de oktobro en Speiderhuset.

Pro tio ke la gastoj devis reverti hejmen al Haugesund la saman vesperon, la klubkunveno malfermiĝis jam je la 18a horo. Nia prezidantino bonvenigis la ĉeestantojn kaj gvidis la kunvenon.

Post malferma kanto Robert Rødsås laŭtleĝis «Mian poemon», belan poemon de iu ukraina verkisto. Poste laŭtleĝis Norman Birkeli «Kiel mi fariĝis esperantisto». Sian unuan scion pri nia lingvo li trovis en «Norsk Barneblad» sub la titolo «Ein drope Esperanto!» Tio okazis en la jaro 1934. Li partoprenis Esperantokurson gviditan de la sveda instruisto Olav Johansson, kaj estis ano de nia klubo ekde la fondiĝo en marto 1937.

Johan Matland rakontis, kiel oni tradukas norvegan poemon al Esperanto. Li estas jam konata tradukisto de diversaj norvegaj poemoj, kaj li donis nun ekzemplon de tiu tre malfacila tasko, kun iom da helpo de la klubanoj!

Manĝopauzo. La inoj de la klubo kunportis delikatajn hejmfaritajn bakaĵojn, kaj ĉio bongustis. De Haugesund venis kvar esperantistoj, kaj el ili Ole Rønnevig kontribuis al la vespero programo per bela kaj interesa kolorfilmo pri sia vojaĝo al la Espe-

ranto-kongreso en Vieno. Finfine nia prezidantino prezentis la novan Ilustritan Plenan Esperanto-vortaron, kaj petis kiom eble plej multaj aĉeti ekzempleron.

Sekr.

Haugesund

MARA VENTO okazigis sian unuan postferian kunvenon la 10/9 sub gvido de la prez. Klara Dahl, kiu bonvenigis la geanojn al nova labor-sezono.

Kelkaj «Mara Vent»-anoj partoprenis la kongreson en VIENO, kaj unu el ili, Ole J. Rønnevig, prezentis tre interesan kaj plaĉan kolor-filmon — parte pri la kongreso kaj parte pri la kongres-vojaĝo. Li kaptis aron da karakterizaj kongres-fragmentoj kaj vidigis al ni vojaĝ-travivaĵojn, jen vizitante pitoreskajn vin-urbetojn en la romantika Rejn-valo, jen vojaĝante sur la riverego Danubo. Multan aplaudon al la programulo.

En la kunveno estis pritraktata la aŭtuna studlaboro kaj estis informate, ke okazos komenca kurso en la kadro de la kurs-plano de «Folkeakademiet». Gvidos ĝin la ĉefino Jarmila Ŝestakova.

Estas ankaŭ la intenco okazigi studrondon por daŭrigantoj. Cetere ni kaftrinkis kaj nin distris per lingvoinstruna ludo.

oto

*

MARA VENTO havis fine de majo sian lastan antaŭ-ferian kunvenon.

Programulo estis «Arquebus» (milita kod-nomo), alinome Sverre K. Andersen, kiu en tre intereso-kapta parolado revivigis milit-jarajn rememorojn. Loĝante sur izolita montobieno, li per sekretaj radio-sendiloj kaj -riceviloj estis en regula kontakto kun la milit-aliancantoj en Anglujo, kaj sendis kaj ricevis gravajn milit-raportojn. Nur liaj samdomanoj, ĉe kiuj li estis dungita kiel farm-laboristo, sciis pri lia sekreta kaj riskoplena laboro. Por ke aliuloj ne suspektu lin, li devis ĉiam roli kiel stultulo. Kelkfoje li devis fronti danĝerajn situaciojn, sed li sukcesis dum la tuta milito kaŝi sian sekretan agadon.

Estis loto-tiro de la kluba pup-loterio (tri nacikostume vestitaj pupoj). Multe da uzitaj poŝtmarkoj por NEL estis liverataj — Kiel kutime oni vigle kantis.

*

MARA VENTO kunvenis la 9-an de aprilo kaj kunlige kun la universala kongreso ĉi-jare okazonta en la bela, loga Vieno, la ĉefa programo temis pri la kongreslando Aŭstrio. De la aŭstra ambasadejo en Oslo estis pruntita kolor-lumbilda materialo, kaj la bildojn prezentis la prezidantino aldonante trafajn komentariojn. La lumbildoj donis plaĉajn impresojn pri la ŝatata turist-lando — jen ni vidis belajn partojn de la aŭstra ĉefurbo, jen pejzaĝojn el aliaj partoj de la lando kiu posedas multe da natur-belaĵoj. Aparte pitoreska landparto aŭstra estas kolorplena Tirolo . . .

La programon bone ĝuis la ĉeestantaro kaj sekvis danka aplaŭdo al la programulino. Okaze de la aŭstra vespero» estis aranĝita eta ekspozicio de afiŝoj kaj plaĉaspektaj broŝuroj.

Diversaj klub-aferoj estis priparolataj — pup-ellotado, la pripensata vojaĝo al Vieno kaj kolektado de uzitaj poŝtmarkoj por sendi al NEL. Plue la prez. memorigis pri la distrikta jar-kunveno okazonta en Rosendal la 6-an kaj 7-an de junio. Relative multaj geanoj ĉeestis la kunvenon.

Rap.

Kristiansand S.

Kristiansand Esperantoklubb havis kunvenon 8/10-70. La prezidanto rakontis pri la kongreso en Vieno. Sinjorino Vik laŭlegis la kluban gazeton. Oni priparolis la venontan UNO-kunvenon. Oni ankaŭ decidis havi feston en marto. Jubilea festo.

B. V.

Sarpsborg

La Urso regule konvenas. En ĉiu kunveno la prezidanto instruas tabule kaj per komikaj desegnaĵoj pri vortoj kaj gramatikaĵoj. En unu kunveno J. Hammond Rosbach lumbilde prezentis arton sur poŝtmarkoj, kaj komenariis pri la montrataj artaĵoj. En alia kunveno Th. Resberg verve rakontis pri la Internaciaj Kursoj en Helsingør, forte rekomendante la paroligan medion. Cetere ni okazigis «amerikan aŭkcion» de poŝt-

markoj, jen por la kluba kaso, jen por la ekonomio de nia gazeto, kiun ni cetere subtenas per aĉeto de loteriaj kovertoj kaj de pm. kun legebla lokstampo.

PETO

Raportantoj al Norvega Kroniko bonvolu tajpi la manuskriptojn kaj zorge apliki la necesan kvanton de supersignoj!

AŬTUNAJ KURSOJ EN ÅRHUS

Internaciaj aŭtunaj feriaj kursoj okazis ĉe Århus, Danlando 18.—24. oktobron 1970 sub gvidado de S-ro L. Friis. Ca. 45 partoprenis, el tiuj 30 el Skandinavio, la resto el diversaj landoj en Eŭropo. Oni loĝis en la altlernejo «Junaj Hejmoj», kiu estas tute nova kaj tre bela.

Estis kurso por komencantoj laŭ metodo Friis kaj kurso por progresintoj kaj konversacia kurso. La lecionoj okazis antaŭtagmeze. Posttagmeze oni aranĝis ekskursojn al interesaj lokoj en kaj ĉe Århus. Vespere estis prelegoj kun lumbildoj, kantado k.t.p. La kunesto estis tre agrabla, kaj oni parolis nur Esperanton, kelkaj kun malfacileco, sed multaj flue. La vetero kaj aŭtunaj koloroj estis belegaj. Dum la finfesto la etoso estis vigla kun kantoj, skeĉoj, dancado — kaj kompreneble kun kafe!

Johs. H. Lunr.

*

På norsk



PLENA ILUSTRITA VORTARO

Er titelen på det imponerende ordboksverket som nylig er utkommet på Esperanto. Det er et monumentalt verk på

En nia rondo estas multaj esperantistoj, kiuj deziras korespondi kun norvegaj gesamideanoj. Bonvolu skribi al: S.ro Józef Roman Maksymiak, Ciechomice 38, pta. WRZACA, pow. Slupsk, woj. Koszalin, Polujo.

Miaj junaj gelernantoj (20—50 jaraj) deziras korespondi kun vi. Skribu al: s.ino Abe Kimi, Ogikubo 5-15-13, Sugiyama, TOKIO, Japanujo.

Margarita Dobrinovska, Sofia 21 — Bulgarujo ul., Krum Popov 30. dez. korespondi.

Mi volas skribi kun homoj en via lando. Mi havas 20 jarojn. Miaj hobiaj estas turismo, muziko, arto kaj propagando de Esperanto. Emanuel Mimra, UHRINEVES 565, Ĉeĥoslovakujo.

1 299 sider, og i tillegg 30 sider med illustrasjoner. Spesialister fra mange land har vært medarbeidere, og av særlig interesse for Norge må det nevnes at alle illustrasjonene er utført av fru Eva Støp-Bowitz, Oslo, med assistanse av hennes sønn Einar.

FILMER PÅ ESPERANTO

En reke institusjoner og firmaer har gått over til å lage sine reklamefilmer også på det internasjonale språket Esperanto. Ved å benytte dette språket kan de nå mennesker i mange forskjellige land. På årets verdenskongress for Esperanto, som ble holdt i Wien i høst, ble det således vist reklamefilmer i Esperantoversjon fra bl. a. Fiat, Slovakisk Fjernsyn, Østerrikes Naturvernforbund, Flyselskapet Finnair og Norges Statsbaner.

*

Korespondu!

Mi deziras korespondi kun sinjoro, prefere edzo, en Norvegujo. Mi estas 29-jara edzo, urboplanisto. Ĉefaj interesoj: filatelo, muziko, sporto, turismo, geografio. Paul M. Fearn, 20, Stonehouse Park, Thursby, Carlisle CA5 6NS, Cumberland, Anglujo.

37-jara instruisto, fotoamatoro, deziras interŝanĝi bildkartojn. Resp. garantiata. Josef Šlachta, Obránců Míru 81890, Havířov 3, Vysluň, Ĉeĥoslovakujo.

NORSK ESPERANTO-FORBUND (*Norvega Esperantista Ligo*)

Postadresse: Boks 942, Oslo. Postgiro 100.30
Kontoradresse: St. Olavsgate 27 III, Oslo
Telefon: 20 20 83
Kontortid: Tirsdag og fredag 15.30-16.30

Turisma Servo: Boks 942, Oslo.
Postgiro 100.32

ESPERANTOFORLAGET A/S (*Eldonejo Esperanto A/S*)

Postadresse: Boks 942, Oslo. Postgiro 100.31
Kontoradresse: St. Olavsgate 27 III, Oslo
Telefon: 20 20 83

Ĉefdelegito de U.E.A.:

S-ro Alfred Skyberg, Østensjøvn. 118 a,
Oslo 6. Postgiro 133.29

La redakcio:

Johan Hammond Rosbach,
Hulderveien 17 B, N-1700 Sarpsborg. —
Telefona: 54 727

Ekspedejo de Norvega Esperantisto:
Boks 942, Oslo 1.

Trykk: A. Sæther A.s - Hamar